| | | |
|---|---|---|
| Esperanto-kurso<br>por progresantoj | Dato: 15.11.3<br>Versio: 2 | Xosé Conde<br>CC BY NC SA |

# 8. Klasĉambro lingvaĵo (2)

Kiel oni diras … en Esperanto?

Kion signifas …?

Mi ne scias [kiel diri tion en Esperanto]

| | | |
|---|---|---|
| Bonvolu<br>Ĉu vi povas | legi<br>paroli en Esperanto<br>paroli pli malrapide<br>aŭskulti<br>silenti<br>ne krokodili<br>fari tiun ekzercon<br>eksidi<br>ekstari<br>helpi min<br>klarigi la vorton/ esprimon… | [?] |

Ni daŭrigu [la legadon]

Daŭrigu!

Estas via vico

| | |
|---|---|
| Kiu volas | legi?<br>skribi?<br>daŭrigi? |

Ĉu estas iu volontulo?

Ĉu vi pretas?

Ĉu mi helpu?

I-isto: Ĉu vi jam finis?

L-anto: Ankoraŭ ne!

## Ekzercoj

1. Kompletigu la dialogojn per vortoj el la fraz-modeloj

**Dialogo 1:**

a. Mi …………. …………. la vorton "klarigi"

b. Ankaŭ mi ne …………. tiun vorton

a. …………. …………. "klarigi"?

c. "Klarigi" signifas ekspliki, igi klara, fari ke io estu klara

a. Dankon!

**Dialogo 2:**

a. Kiel …………. ………….”escoltar” en Esperanto?

b. Aŭskulti

a. Dankon

**Dialogo 3:**

a. …………. volas legi?

b. Mi!

a. Dankon. …………. silenti!

**Dialogo 4:**

a. Bonvolu ne ………….

b. …………. signifas *krokodili*?

a. *Krokodili* …………. paroli la nacian lingvon inter esperantistoj

**Dialogo 5:**

**a.** …………. ………….  ………….  ………….?

**b.** Jes, ni finis

**a.** …………. …………. ………….?

**b.** Jes, ni pretas

**c.** Mi ankoraŭ ne!

**a.** …………. …………. ………….?

**c.** Jes, bonvolu helpi min, dankon

**Dialogo 7:**

a. Ni …………. la legadon. Ĉu estas via ………….?

b. Ne, mia

2. Kompletigu la frazojn per unu el la vortoj listigitaj dekstre

| | |
|---|---|
| • …………. volas daŭrigi?<br>• …………. oni diras "..." en Esperanto?<br>• …………. signifas "krokodili"?<br>• …………. vi povas silenti?<br>• …………. estas "krokodili" en la kataluna?<br>• …………. vi povas legi? | ĉu<br>kio(n)<br>kiel<br>kiu |

3. Skribu la taŭgan demandon kiu korespondas al la respondo

| | |
|---|---|
| | ← Mi volas legi |
| | ← Jes, mi povas silenti |
| | ← "Kompletigi" signifas igi kompleta, fari ke io estu kompleta |
| | ← Jes, mi povas eksidi |
| | ← Ne, mi ankoraŭ ne finis |
| | ← "Amor" en Esperanto oni diras "amo" |
| | ← Jes, mi estas volontulo |

4. Kompletigu la dialogon per unu el la vortoj listigitaj dekstre

a. …………. vi fartas?
b. Tre bone, dankon
a. Pri …………. vi laboras?
b. Mi estas komercisto
a. En …………. urbo vi loĝas?
b. En Barcelono
a. …………. vi naskiĝis?
b. En 1970
c. Kaj ………….?
d. En Ĝirono
a. …………. aĝa vi estas?
b. Mi estas 36-jara
a. Dankon, ĝis revido!

kie

kio

kiu

kiom

kiel

kiam